738 BOLETIM

Kontaktilo

BIBLIOTEKO Dirceu Portinculo

MONATA INFORMILO-Jaro I-N-ro 01/86-Porto Alegre-RS-Cz$2,oo

APRILO-1986

SALUTOJN!

Ni estas ĉi tie, por labori kaj disvastigi Esperanton.

Post la VIIIª Kongreso de BEJO, okazinta en nia urbo, kelkaj gaŭĉa Esperantistoj sentis la bezonecon daŭrigi la klopodojn por plifortigi la Esperantan Movadon ĉe ni. Okaze de ESPA-kunsido antaŭ nia propono pri kreo de aparta Departemento kaj vigligo de la gaŭĉe movado, ties estraro akceptis nin kun malfermitaj brakoj. Do, de tiam ni ekformis la Departementon pri kulturo kaj Disvastigado.

Ni havas multe da skizoj kaj bezonas ĉies kunlaboradon, kaj kiel ĉiam en nia lando-malriĉa-, subtenon por antaŭen porti nian taskon. Do, ni, bonvolonte, akceptas sugestojn, monhelpadon, kunlaborantojn kaj atendas kaj esperas Vin ĉe ni.

Oni povas rememori:

"Ni semas kaj semas, neniam laciĝas
Pri l'tempoj estontaj pensante..."

Kaj diri nun :

Ni volas semi, kaj ankaŭ rikolti ĉar la tempoj estas jam alvenintaj.

Ekstere, la militoj daŭras; la landoj aĉetas ĉiam pli kaj pli armilojn; la infanoj vidas per TV plifortemajn programojn, kaj ludante ili lernas mortigi; Oni devas agnoski ke nuntempe la gepatroj laboras kaj la infanoj estas preskaŭ forlasitaj; sed la idealo de sim-

pla okulisto de Bialistok alvenas ĉe ni... la verda stelo brilas timema, kaj se ni plifortigu ĝin la afero sanĝiĝos.

NE al atomenergiaj armiloj
al ambiciuloj
al perforto
al malamo

JES al paco
al mildaj kaj pacemaj
al Amo.

Oni donis jam la unuan paŝon...venu paŝi kun ni.

ESPERANTO ESTAS ĈIES KAJ NENIES!

Bonvolu, skribi al ni por sugesti, opinii kaj koni Esperanton kaj ĝian utilecon nuntempe kaj kiel oni povas plibonigi nian movadon.

Dankon,
via amikino Sílvia.

DEPARTEMENTO PRI KULTURO KAJ DISVASTIGO DE ESPERANTO

Kreita je 12.IV.86

Respondeculoj: Sílvia d'Avila Araujo
Zélia Coelho da Silva
Cleonice de Lima
Ana Torres Silva
Marivaine Alencastro
Solon Santana
Ernani Borges
Wenceslau Gonçalves

Celoj: Disvastigi kaj plifortigi Esperantan Movadon en Porto Alegre.

KANTU KUN NI!...

Saŭdado(gaŭĉa kanto)

Muziko kaj teksto de I. Sanguinetti

Kiom da saŭdado *
Mi sentas pri kamparo,
Pri ĉimarono*, kiu refortigas min;
Pri la ĉevalo, ĉrasko*, gaŭĉaro,
Kaj pri la dolĉa kaj bela gaŭĉin'.

Ho vi, saŭdado, ne lasu min;
Brunulineto, mi amas vin...

REKANTAĴO
Kun la saŭdado, ho karulin'
En mia koro, estas ĉiam memoro
Pri vi, amatin'.

*saŭdado - resopiro, kormalĝojo.
ĉimarono- tipa gaŭĉa sorbtrinkaĵo.
ĉurasko - tipa gaŭĉa viandmanĝaĵo.



Piedpilkado - Meksiko - 1986

"La kuraĝaj piedpilkistoj defendos nian Patrujon en Meksiko. La popolo vibras kaj suferas pro tio." Sed la sportistoj ricevas altmonsalajrojn kaj vivas kvazaŭ Reĝoj, sed la junuloj kiuj lernas en Ŝtataj Lernejo - ĉu ili povas studi aŭ praktiki sportojn por Olimpiadoj? Bonvolu, pensu pri tio.

KIU DEZIRAS?

Kunlabori Esperanton Movadon?

Bonvolu, skribi aŭ telefoni - ESPA 25-3941

NI BEZONAS VIN!



ANGULETO DE LA AMIKECO

Ĉu vi deziras korespondi? Sube jen estas nomo kaj adreso de gaŭĉinaro kiuj pretas respondi interŝanĝi leterojn kun vi. Do, ek al!...

* Ana Lúcia Torres Silva- str.Mário Gageiro,268-São Tomé- 94400- Viamão (RS).
* Cleonice de Lima- str.Hipólito da Costa,241/308- Santa Teresa- 90650- Porto Alegre (RS).
* Sílvia d'Ávila Araujo- str.Gomes Jardim,380/03- Santana- 90620 - Porto Alegre (RS).
* Marivaine Alencastro- str.12 de Outubro, 63- Partenon - 90630 - Porto Alegre(RS).
* Helena Tozzi - Av.Viena, 71- B.São Geraldo- 90000 Porto Alegre(RS().

SEN-VORTOJ



Aprilo, diris la kantisto Dorival Caymmi, estas la monato de la rozoj - floroj aŭ virinoj, sed la monato de la rozoj. Sed al ni, Esperantistoj, amikoj de la paco, estas la monato en kiu ESPA, nia societo- da trevenas.

Dank'al la klopodoj de la unuaj esperantistoj de nia urbo, ESPA ekaperis antaŭ 41 jaroj kaj ĉiam alfrontis malfacilaĵojn; ekde tiam ESPA daŭras kvazaŭ verda steleto kiu, ĉi tie, montras la idealistojn- La verda Donkiĥoto. Multaj el la fondintoj ne estas plu inter ni, ili jam forpasis. Sed iu ajn estu nia religio, oni kredas pri alia vivo kaj kiel diris sankta Agostinho - kie estas nia penso estas nia koro. Tial ni scias ke ili estas feliĉaj nun.

Je, 27/04- dimanĉe - oni memorfestos la eventon, do ni atendas vin - simpatiemaj kaj esperantistoj -en "Clube do Comércio" je la 12ª horo por tagmanĝi ĝoje kaj fratece.

Ĝis tie!

Kio ? Datreveno de ESPA

Kie? Clube do Comércio - Andradas, 1085 2ª etaĝo

Kiam? 27.04.86 je la 12ª horo

Bufedo: 21 malvarmaj manĝaĵoj } Cz$ 50,00
9 varmaj manĝaĵoj } Sen trinkado
deserto

Ekspozicio de libroj kaj esperantaĵoj en la loko.

NACIA KONGRESO EN K U R I T I B O

PEA- Paraná Esperanto-Asocio,kiu,nome de NEK-Nacia Esperanto-Komisiono, respondecas pri la organizado de la 22ª Brazila Kongreso de Esperanto,informas pere de sia informilo,ke ĉio estas preta rilate la kongreson.

La organiza komisio ankaŭ mencias la valoron de la kotizoj:
Kat.1(plenaĝulo):Cz$ 106,40;
Kat.2(akompananto):Cz$ 53,20;
Kat.3(institucio): Cz$ 212,80;
Infano ĝis 12-jara kaj akompananto de malavantaĝulo nenion pagas.

Pere de la dua cirkulero dissendita alla Asocioj, oni sciiĝis pri la provizora programo,la komuna loĝejo, turismo, kaj la aliaj aferoj disvolvotaj dum tia naciskala evento.

Se vi ankoraŭ ne aliĝis al la Kongreso, bonvole, tuj agu por garantii al vi la partoprenon.

PEA-fono:(041)234-3157

→ K O N T A K T I L O

ESPA-Informilo

Korespond-adreso:
Rua dos Andradas,1137/1704
tel.:25.3941 - Centro -
Porto Alegre - RS
CEP 90.000